



Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2003 numero 5-a: novembro /decembro  
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de novembro



« Che le rēbēterais engore, pour ceux  
qui ne l'ont pas endendu, che  
ne diens pas à ce que ma goncierche  
recoivent des tevoirs sans enfelobbes. »  
(M: KART)

**Karikatura poŝtkarto de parizaj studentoj mokantaj pri sia profesoro de germana lingvo Théophile Cart per la teksto: "Che le rēbēterais engore, pour ceux qui ne l'ont pas endendu, che ne diens pas à ce que ma goncierche recoivent des tevoirs sans enfelobbes (Mr Kart)." Esperantiga provo: "Mi dion angoraŭ ribetas, por diuj, giuj dion ne aŭdis, mi ne agceptas, ge mia bordistino ricevas taskojn sen govertoj." Filo de svisgermana pastoro, la dulingvulo Théophile Cart konservetis en la franca alemanan dir-manieron, kiu ridigis la parizan publikon. Claude Gacond, CDELI).**

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio:

Claude Gacond, Poŝtfolio 5031,  
CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: [claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch) &  
[gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

Tel. ĉe CDELI: 032 967 68 55,  
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:  
indiki: por Claude Gacond

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Andy Künzli,  
Richard Schneller.

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj por la venontaj numeroj

**2004-1:** januaro-februaro: decembre 15.  
Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

**2004-2:** marto-aprilo: februare 15. Mencio  
de informoj ekde la 15-a de marto.

**2004-3:** majo-aŭgusto: aprile 15. Mencio de  
informoj ekde la 15-a de majo.

**2004-4:** septembro-oktobro: aŭguste 15.  
Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

**2004-5:** novembro-decembro: oktobre 15.  
Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

## SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,  
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59. Ret-  
poŝto: [bgraf.o@bluewin.ch](mailto:bgraf.o@bluewin.ch)

Dietrich Weidmann, vicprezidanto, PF 301,  
8034 Zürich. Tel.: 01 251 50 25. Retpoŝto:  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys  
4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14 67. Ret-  
poŝto: [n.margot@bluewin.ch](mailto:n.margot@bluewin.ch)

Hans-Werner Grossmann, kasisto, Brühlweg  
16, 4132 Muttenz. Tel.: 061 462 03 51.

Chiara Fabbri, peranto itallingva kaj junul-  
ara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto:  
[chiara-fp@bluewin.ch](mailto:chiara-fp@bluewin.ch)

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo  
2300 La Chaux-de-Fonds

## Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr. 10	infanoj	ĝis 18 jaroj
fr. 20	junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	paroj	"
fr. 70	patronoj	"
fr. 25	nura abono al	<i>SES informas</i>



# Svisa kalendaro

## Novembre

- 15: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.  
15: Rotkreuz: SAEF: 41-a GERI.  
25: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
27: Basel: ESB: kunveno.

## Decembre

- 3: Luzern: LES: Zamenhofa festo.  
3: Wil: EKW: Adventa vespero.  
6: Basel: ESB: Zamenhofa festo.  
6: Genève: esperanta marŝo al Palaco de Nacioj.  
9: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
13: Zürich: ESZ: Zamenhofa festo.  
14: Lausanne: LES: Zamenhofa festo.  
15: **Redakta datlimo de SES informas.**  
27-3 jan. 2004: Kiel (DE): 20-a IFJ.

## 2004 Januare

- 2-4: Chaux-de-Fonds: KCE: Zamenhofologiaj tagoj.  
5: Lausanne: LES: Kunveno.  
6: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
7: Luzern: LES: Konversacia rondo.  
17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.  
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
31: Chaux-de-Fonds: KCE: Asembleo.  
31-1 feb.: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

## Februare

- 2: Lausanne: LES: Ĝenerala Asembleo.  
3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
6-28: Vevey: Ekspozicio pri esperanto.  
7: Vevey: SES-jubilea sabato kun Andy Künzli.  
13: Mitholz: JES-SES: Lötschberg-tunela vizito.  
13-15: Kandersteg: JES: Svisa vintra semajnfino.  
15: **Redakta datlimo de SES informas.**  
17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.  
28-29: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

## Marte

- Marte-aprile:** Le Locle. Ekspozicio pri esperanto.  
9: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.  
23: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
27-28: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

## Aprile

- 8-12: Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.  
15: **Redakta datlimo de SES informas.**  
24-25: Locle-Brenets: SES jubilea semajnfino.

## Maje

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
15: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato  
15-16: JES: Kurs-semajnfino.  
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
22-23: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

## Junie

- 8: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.  
22: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.  
26: Basel: ESB: kunveno minigolfa.

## Julie

- 5-10: Grindelwald: KCE: naturamika semajno.  
13-18: Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.  
20-25: Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.  
24-31: Beijing (Ĉinio): 89-a Universala Kongreso.

## Aŭguste

- 2-6: Engadino: KCE: romanĉa semajno.  
7-14: Chaux-de-Fonds: KCE: Kultura semajno.  
14-21: Chaux-de-Fonds: KCE: Seminario.  
15: **Redakta datlimo de SES informas.**

# Vivo de SES

## Festado de la centjariĝo de Svisa Esperanto-Societo Lausanne-Rolle 27-an de septembro

### Sur la spuroj de la fondintoj

Varmaj sunradioj kaj alpkornaj melodioj akceptis la festpartoprenantojn en la haveno de Lausanne-Ouchy sabaton 27-an de septembro. Post agrabla refortiĝo de la alvenintoj per kafo, trinkaĵoj kaj bulkoj en la hotelo "Le Château d'Ouchy" sekvis informoj de la organizanto Claude Gacond kaj enkonduka paroladeto de la prezidanto de SES Bruno Graf, kiu ambau esprimis kontenton pro la multnombra partoprenantaro: 108 personoj. Bedaŭrinde oni vane atendis la anoncitajn salutvortojn de Daniel Brélaz, urbestro de Lausanne: li ne venis. Kompense kaj konsole plezurigis nin Marion Bélisle-Grosjean per la unua suito por violonĉelo sola de J. S. Bach.

### Ŝipveturo

La alpkornisto Rémy Schroeter jam anoncis al la jubileantoj la enŝipiĝon por surlaga veturo al Rolle. La malnova padelrada ŝipo "Italie" portis la ekskursantojn sur la supra ferdeko unuaklasa, kie aperitivo vigligis la interkonajn babiladojn. La kantoj de la

laŭzana grupo kuraĝe spitanta per mikrofono la bruon de la dizelaj motoroj gajigis la pasaĝerojn.

Iom post iom malproksimiĝis la domegoj de la urbo Laŭzano kaj prezentiĝis panoramo kun la karakterizaj pintoj de la Alpoj vaŭdaj, valezaj kaj savojaj fone de la Lemana lago en luma atmosfero kun sunradioj penetrantaj tra nuboj, motivo povunta inspiri Ferdinandon Hodler, kiu ofte pentris la regionon.

### Rolle, urbeto de la fondiĝo

Alproksimiĝis jam la kastelo de Morges kaj baldaŭ tiu de Rolle, kie la ekskursantoj elŝipiĝis kaj ariĝis altirataj de la alpkornista duopo Rémy Schroeter kaj François Randin antaŭ la kazino por komuna fotado kaj aŭskulto de solista kantado de *La Espero* fare de Jean-Thierry von Büren, kiun akompanis la violonĉelistino Marion Bélisle.

Post mallonga promeno en la lago-borda ĝardeno la restoraciaj tabloj por la bankedo rapide okupiĝis. Inter la diversaj pladoj estis sufiĉe da tempo por babilado, sed ankaŭ por prezent-

ado de distraj eroj kaj memorigo pri la fondo de SES antaŭ 100 jaroj en la urbeto Rolle.

Mireille Grosjean laŭtlegis la salut-mesaĝojn, inter aliaj la gratulojn de la prezidanto de UEA Renato Corsetti kaj kuraĝigajn vortojn de personoj ligitaj al CDELI (Detlev Blanke, Tazio Carlevaro, Herbert Mayer).

Reprezentantoj de lokaj grupoj rekte intervenis: por la ĝenevanoj de "La Stelo" estis Anita Altherr, por Lucerno Sonja Brun kaj por Zuriko Dietrich Weidmann, kiu siaflanke jam invitis por baldaŭa centjariĝa festo de la zurika grupo.

Por fakaj asocioj salutis Gertrud Eggenberger (fervojistoj), Benno Frauchiger (junularo), Nicole Margot (defendantoj de etnaj lingvoj).

La instruistoj kaj lernantoj de la privata lernejo ĉaŭdefona "La Granda Ursino", en kiu esperanto estas instruata, pardonpetis pro neĉeesto, ĉar ili samtage festis la 20-jaran ekziston de sia lernejo.

Rolle-anino kaj la plej aĝa el la partoprenantoj estis Marguerite Jaccard-Besson. Ŝi rememorigis pri la spicejo de siaj geonkloj Charles kaj Jenny Jayet-Besson en Morges, kie ĉiuj deĵorantoj interparolis esperantlingve.

### Memorindaj historiaĵoj

Andy Künzli rakontis pri la fondo de SES okazinta en la hotelo "La Tête Noire" en Rolle. Ne estis al li facile trovi informojn pri la unua prezidanto de SES, Eugène Failletaz, kiu naskiĝis en Essertines-sur-Rolle. Li estis industriisto-komercisto, prezidanto de la Komerca ĉambro vaŭda, fondinto de

Comptoir suisse en 1916 kaj forpasis en la jaro 1943. Li interesiĝis pri la praktika apliko de esperanto en komerco kaj turismo, sed pro siaj multaj priokupoj ne longe restis prezidanto de SES.

En Gland apud Rolle nun loĝas kaj verkas Claude Piron. Claude Gacond atentigis, ke samloke Edmond Privat posedis ĉaledon, kie li retiriĝis por verkadi en trankvilo. Fakte 13-jara li esperantiĝis la jaron mem de la fondo de SES, kaj ankoraŭ junaĝe li verkis sian poemaron *Tra l' silento*. Kun plezuro ni aŭskultis la reciton de du el tiuj poemoj: *Tre dolĉe sur lago* kaj *Lasta kiso* fare de nuntempa junulo ĉaŭdefona Luc Allemand, kiu ankaŭ kantis kanzonon, kiun li mem esperantigis.



Edmond Privat en 1912 laŭ karikaturna desegno de Jean Robert. (CDELI)

## Kantoj kaj vortludoj

Sekvis muzika momento kun kantoj de Beethoven (Himno de ĝojo) kaj V. Para (Dankon al la vivo) fare de Joëlle Grosjean violonĉele akompanata de ŝia fratino Marion. Oni povis konstati, ke ekzistas talentaj junuloj inter la svisaj esperantoparolantoj. Sed talento kompreneble ne dependas de la aĝo. Tion pruvis Claude Piron, kiu virtuoze kaj sprite vortludis pri Rolle. Liajn "prirolaĵojn" vi legos aliloke en tiu ĉi bulteno.

Fine Rémy Schroeter jodlis laŭ friburga melodio kaj ludis per ligna instrumento nomata "büchel" simila al trombono, kiu imitas la tembron de la alpa korno, sed pli facile transporteblas.

Venis la tempo por trajna reveturo al Laŭzano. Survoje al la stacidomo eblis vidi la ŝildon de la iama hotelo "La Tête Noire" nun transformita en vendejo de antikvaĵoj.

Estis bela uverturo por la jubilea jaro de la centjariĝo de SES, kiu finiĝis en la stacidomo de Laŭzano per adiaŭa kanto de la laŭzianoj. Ĝis la venontaj jubileaj rendezuoj!

Richard Schneller.

## Fotoj kaj filmoj

Stefano Keller nun pretigas CD-diskon, kiu ebligos spekti laŭ pluraj formatoj kvin-dekon da fotoj kaj 12 filmetojn, kiujn li realigis en Ouchy, surŝipe kaj en Rolle okaze de la SES-jubilea sabato 27-a de septembro.

Eblas ankaŭ rete konsulti tiun ĉi fotalbumon:

<<http://www.esperanto-gacond.ch/svisa-esperanto-societo-100-jara.html>>

François Randin ne nur alpkorniste partoprenis la jubilean sabaton. Ankaŭ kiel filmisto li rolis. Baldaŭ ni havos la ĝojon spekti lian filmon okaze de venonta jubilea renkonto.

Laurent Burgbacher ankaŭ fotis kaj liajn fotojn oni povas rete spekti je: <<http://www.alawa.ch/centjarigxo/>>

## Salutoj

### Saluto de Renato Corsetti

Estimataj estraranoj de SES, karaj svisaj esperantistoj kaj eksterlandaj partoprenantoj.

Okazas aferoj en la vivo, pri kiuj ni ne havas meritojn, sed tamen ili okazas ĝuste al ni.

Ekzemple mi, kiu apenaŭ faris ion por la svisa esperanto-movado, havas nun la honoron saluti vin nome de Universala Esperanto-Asocio, alivorte nome de la tutmondaj esperantistoj, okaze de la centjariĝo de via Svisa Esperanto-Societo. Mi ĵus diris "via Svisa Esperanto-Societo", sed efektive mi estus devinta diri "nia svisa esperanto-movado", ĉar Svislando dum la lastaj cent jaroj faris al la monda esperanto-movado kontribuojn, kiajn faris malmultaj aliaj landoj.

Vi scias pri tio multe pli ol mi, vi aŭdos pri tio hodiaŭ en dokumentitaj prelegoj, kaj do mi ne riskas daŭrigi, sed vi bonvolu scii, ke kiam en la tutmonda Esperantujo estas aŭdata la

vorto Svislando, ondo de varmaj sentoj aperas en la koroj de la parolantoj de la internacia lingvo. Eĉ en la plej fora angulo de Esperantujo, ni diru Nepalo, ĉiuj esperantistoj scias pri la neŭtraleco de Svislando, kiu kunligiĝas kun la neŭtraleco de esperanto. Ĉiuj scias pri la plurlingveco de Svislando kaj pri la kunvivado de ties gentoj, kiuj ofte rolas en niaj informaj argumentadoj. Kleruloj scias ankaŭ pri viaj bibliotekoj kaj esplor-centroj. Historiistoj scias pri la rolo de Svislando en la esperantistaj agadoj dum la unua mond-milito aŭ pri la rolo de Svislando en la periodo inter la du mondmilitoj de la pasinta jarcento. Informantoj pri esperanto neniam forgesas mencii pri tio, kio okazis en Svislando en la Societo de Nacioj rilate al esperanto. Studantoj pri Zamenhof citas ofte lian gravan paroladon en la Universala Kongreso en Ĝenevo en 1906-a, kaj admirantoj de Lapenna neniam forgesas la gravan rolon de la unua Universala Kongreso en Berno en 1947-a post la dua mond-milito.

Tamen ne estas mia tasko paroli al vi pri la pasinteco. Mi devas paroli al vi pri la nuna kaj pri la estonta tempoj.

Hodiaŭ la internacia esperanto-movado estas en tre problema situacio, kiel, cetere, ĝi ĉiam estis. Unuflanke ni estas premataj, forte premataj de la buldozo de la angla lingvo, kiu ŝajnas triumfe dispreni ĉiujn lingvojn kaj kulturojn, kiujn ĝi renkontas antaŭ si. Tio igas la ideon pri internacia lingvo jes reala, sed en maniero, kiu igas la ostojn de Zamenhof kaj de la aliaj pioniroj de internacia samnivela inter-

kompreniĝo malkvieste turniĝi en la tomboj. La internacia interkompreniĝo, kiu realiĝas per la angla, estas la interkompreniĝo inter mastro kaj sklavo. Ne lasu vin esti trompataj de la ŝajna libera elekto de la angla. Temas pri libera elekto de loĝantoj en kolonioj, kiuj volonte asimiliĝas al la regantoj por ricevi kelkajn panerojn de potenco kaj prestiĝo.

Zamenhof revis pri io alia, kaj ni kunrevas kun li, pri mondo, en kiu ĉiuj gentoj, grandaj kaj malgrandaj, estos samnivelaĵoj, pri mondo, en kiu la svisaj popolaj kantoj estos same gravaj por la eksterlandanoj kiel la usonaj vakeraĵoj popolaj kantoj, pri mondo, en kiu la fonto de la informoj, kiujn oni ĉiutage aŭdas el sia televido, ne estos nur unu en la tuta mondo, pri mondo, en kiu ĉiuj popoloj estos same taksataj.

Tamen, ne pensu, ke la nuna situacio estas unika. Ĉiam tra la homa historio estis starigantoj de imperioj. Miaj propraj prapatroj el Romo provis, Karlo la Granda provis, la naziistoj provis, la marksistoj provis, ktp. Nun estas la vico de Usono provi. Tamen la historio rakontas, ke ĉiuj starigantoj de imperioj en la fino malsukcesis. Certe por vivantoj en la koncernaj periodoj estas malfacile antaŭvidi la estontecon, sed ne estas kialo, kial la nuna imperio devos eterne daŭri. Verŝajne niaj esperantistaj nepoj havos la grandan problemon rezisti la invadon de la hispana, aŭ de la ĉina aŭ de la araba. Neniu povas nun antaŭvidi tion, sed ni certe povas antaŭvidi, ke la ideoj pri libereco kaj egaleco inter ĉiuj ne

mortos kaj ade renaskiĝos en ĉiu generacio.

Aliflanke ni estas ankaŭ en bona situacio, ĉar lastatempe la pozitivaj voĉoj pri esperanto refortiĝis. Mi ne citu al vi la artikolojn favorajn al esperanto, kiuj aperis lastatempe, ĉar vi jam konas ilin. Pli kaj pli da homoj komencas kompreni, ke la lingva malsameco de la mondo riskas malaperi, se ni daŭrigas en la nuna maniero. Unuvorte ni havas daŭre pli da aliancinoj, kaj kun tiuj ni klopodas kunlabori. La interreto estas fenomeno, kiu liberigis potencialajn fortojn dormantajn. En neniuj aliaj historiaj epokoj ni havis tiom da homoj, kiuj provas lerni esperanton. Certaj ne ĉiu aliĝanto al reta kurso venas ĝis la punkto, kiam estas klara la malsama signifo de "mi trovas la vivon bonan" kaj "mi trovas la vivon bona", sed tamen... Ĉiutage aperas junaj homoj en foraj aŭstraliaj aŭ francaj vilaĝoj, kiuj lernas esperanton "anonime" kaj nur parolis kun sia komputilo dum iom da jaroj.

Necesas adaptiĝi al ĉi tiu nuna realo kaj utiligi ĝin. Tio ja estas iom malfacila. En mia loka grupeto en Frakasi, apud Romo, oni malvolonte rezignas je sia ĉiujara kurso kun kvin partoprenantoj, ĉar ĝi estas ankaŭ maniero renkontiĝi kaj havi homan kontakton, kaj tio ankaŭ estas io bona, sed la kvantoj de la lernantoj estas aliloke. En ĉiuj komputilaj medioj, kiujn mi hazarde vizitas, sonas la litanioj de la prizorgantoj de retaj kursoj, kiuj bezonas esperantistojn por prizorgi kaj gvidi la "tro" multajn aliĝintojn.

Niaj strukturoj ankoraŭ ne povas bone prizorgi tion, kaj tiuj lernintoj malvolonte pagas aliĝkotojn, sed estas kialo, kial ni ne povas sukcesi profiti el ĉi tiu nova ondo.

Sed mi skribis jam tro longe kaj mia parolado malhelpas vin ĝui la ŝipekskurson, Mi volas saluti vin per la vortoj de Zamenhof, en tiu fama kongreso de Ĝenevo en 1906-a, ĉar mi scias, ke vi kaj mi apartenas al la esperanto-movado, laŭ la maniero, kiun Zamenhof plej ŝatis. Aŭskultu lin:

*"...tiuj esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia koro, tuj ĉiam sentos kaj ŝatos en esperanto antaŭ ĉio ĝian internan ideon; ili ne timos, ke la mondo mokenomos ilin utopiistoj kaj ke la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj..."*

Vi kaj mi certe apartenas al tiu speco de esperantistoj, kiuj fieras esti esperantistoj, ĉar nia idealo estas idealo de paco kaj de paco en justeco, kaj tion la mondo bezonas nun, kiel ĝi ĉiam bezonis.

Vivu Svisa Esperanto-Societo ankoraŭ dum jarcentoj!

Renato Corsetti

prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

## Saluto de Herbert Mayer

Estimataj gesinjoroj, karaj geamikoj,

Akceptu korajn salutojn el Aŭstrio okaze de via festaranĝo! Kvankam esperanto estas la plej juna el ĉiuj vivantaj lingvoj, ĝi ja havas historion kaj tradicion. 100 jarojn SES nun estas, tio



estas kvin homaj generacioj! Kiom da teruraj uraganoj, kiom da evoluo okazis en tiu periodo! Tamen la rolo kaj celo de esperanto estas same aktuala kiel antaŭ cent jaroj.

Kaj eksterpolu nun tiujn cent jarojn al la futuro. Kompreneble post cent jaroj refoje la mondo aspektos tute alimaniere. Sed mi estas certa, ke ankaŭ en tiu estonta mondo nia lingvo ekzistos. Ĉu ekzistos SES, mi ne kuraĝas prognozi: Ja se esperanto fariĝos la dua lingvo por ĉiu, niaj societoj ne plu havos celon.

Ĉu vu grumblos do, se mi ne aŭguras por vi pliajn cent jarojn?

Persistu kaj kun ĝojo laboru daŭre por tiu eksterordinara lingvo de Zamenhof!

Sincere Herbert Mayer

de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

## Saluto de Detlev Blanke

Estimataj festantoj, bonvolu akcepti miajn bondezirojn okaze de la cent-jariĝo de Svisa Esperanto-Societo.

Mi uzas la okazon por gratuli vin interalie pro la elstara interlingvistika agado, kiun dum jardekoj tre kompetente faras kelkajn membrojn de SES. Mi aparte volas elstarigi la grandegajn meritojn de CDELI kaj ĝiaj aktivuloj. Mi krome vartas la esperon, ke baldaŭ aperos la enciklopedio pri planlingvoj en Svisio. Havu helan estontecon.

Sincere kaj amike Detlev Blanke

de Gesellschaft für Interlinguistik, Berlin.


## Saluto de "La Grande Ourse"

Karaj ĉeestantoj,

Nome de la lernejo "La Grande Ourse", ni kore salutas vin ĉiujn, kaj deziras belegan feston je tiu ĉi granda evento, la 100-jariĝo de SES. Ni tre dezirintus ĉeesti tiun ĉi feston, kaj ankaŭ kontribui al la programo kun niaj gelernantoj, kiuj lernas, parolas kaj praktikas esperanton, sed la tago tute koincidas kun nia festo, nome la 20-jariĝo de nia lernejo, kiu ankaŭ estas granda evento por ni.

Esperable iam, baldaŭ ni trovos la okazon tamen renkontiĝi, interkonatiĝi kaj organizi ion kune.

*Sub tiu ĉi estis multaj porkejoj kaj porkidoj. Poste ni faris paŝaron je la 4-a, kaj ni provis fimanĝi ĉion, kion ni havis en niaj sakoj (sandviĉojn, panon, viandon, fromaĝon, ktp.) Ni ekiris, kaj devis marŝi ankoraŭ 15 minutojn por iri al la fermo, kie ni restos 5 tagojn.*



En sia gazeto *Skribskrapeto* la gelernantoj de "La Grande Ourse" rakontas pri unusemajna restado en farmodomoo.

Ĝis tiam vi povas vidi nian antaŭlastan aktivecon per esperanto, nome la gazeton *Skribskrapeto*, kiun pretigis, skribis kaj ilustris niaj infanoj. Ĝi estas ankaŭ ĉi tie aĉetebla, sen fiksita prezo, do se vi deziras havi kelkajn de ili, prenu, kaj kompensu iomete ĝin laŭ viaj povoj/voloj.

Prenu ekzempleron ankaŭ de nia prospekto pri nia lernejo, sur kiu troviĝas niaj atingebloj, kaj bonvenon je

vizito de nia hejmpaĝo, kiu havas ankaŭ esperanto-version.

Sukcesan feston deziras al vi la tuta lernejo "La Grande Ourse", La Chaux-de-Fonds.

## Tiel rolis la SES-fondintoj Claude Piron

Mia rolo en Rolo (france Rolle), alivorte mia rola rolo, estas roli parole. Mi promesis al Claude (ne al mi, al la alia Claude), ke mi parole rolos en Rolo, sed kiom ajn mi traserĉis mian cerbon, neniu ideo tie troveblis. Ĝi estis malplena, vakua.

Tiam mi pensis: "Nu, mi petos helpo de mia edzino." Sed ankaŭ ŝi ne havis ideon. Tial ni ne povas par-rola, mi devas paroli tute sola (tute malgee, se vi preferas).

Turmentate de la ideo, ke mi devos publike paroli, kaj havas nenion por diri, mi faris kiel mia samnomulo la alia Claude en similaj cirkonstancoj: mi preĝe turnis min al Zaza:

"SOS !" mi kriis.

"SES !" li respondis.

Kaj li aldonis: "Kial vi simple ne gvidus vian publikon al tiu unua tago de la vivo de SES?" Tiam li afable montris al mi, kiel disvolviĝis la fondo de la societo, montrante je ĉiu etapo, kiel la fondintoj rolis.

Por la ekstera mondo, ili estis stranga bando. Vidu, kiel tamen bele kaj bone ili *bande rolis*.

Ĉar estis tre bela vetero, ili decidis lui barkon por kune navigi kelktempe sur la lago. Kaj la fondejo de SES fariĝis *barka Rolo*.

Sed kompreneble necesis reveni sur la firman teron kaj aliri seriozajn aferojn. Decidi pri la enspezoj, la elspezoj, la kostoj, la kotizoj ktp. Trovi iun, kiu akceptos zorgi pri la kontoj. Tiel la lulejo de SES iĝis *kont-Rolo*.

Ĉiuj jam tuj akceptis havigi al la ĵus naskita societo la fiksitajn kotizojn. Sed kien meti la monon? En *kason*, kompreneble! Tiel komenciĝis la gravega *kas-rola* de la respondeculo pri financoj, kun celo klare difinita: kiel plej honeste kaj efike *kase roli*.

Kontentaj pri la bona laboro, kiun ili plenumis fondante la societon, ili iris kune manĝi – tio estas preskaŭ deviga, kiam oni vizitas Rolon – frititajn fileojn de lagaj perkoj, similajn al tiuj, kiujn vi ĵus manĝis. Kaj ĉar la fileojn oni fritis en *pato*, kaj ili estis bonegaj, niaj fondintaj patroj entuziasmiĝis pri la *pat-rola* de Rolo.

Kaj jen unu el ili ekhavis ideon. Ĉiuj ja estis fervoraj esperantistoj, ili tutkore deziris, ke esperanto disvastiĝu, kaj ili pensis, ke por tio nepre necesas instrui la lingvon en la lernejoj. La plej bona taktiko, ili pensis, estas sendi al la aŭtoritatoj peticion tiucelan. La vorto "peticio" ne ekzistis en la lingvo de 1903. Oni diris *petskribo*, ĉar temas pri skribo por *peti*. Tiel, la 27-an de septembro 1903, la naskiĝejo de SES riveliĝis *pet-Rolo*.

Ilin tre impresis tiu rivelado, sed, saĝe, ili decidis esti plej diskretaj pri la afero. Pri tiu *pet-rola* de Rolo ili promesis silenti. Tial vi hodiaŭ povas trankvile paŝi sur la Rolaj trotuaroj. Eĉ ne unu usonan soldaton vi renkontos.

## Esperanto en la vaŭda kantono

Andy Künzli

La unua nomaro de *l'esperantistoj* aperinta en *Svisa Espero* 2/1903 menciis inter aliaj H. Bartenstein-Weith kaj Eugène Failletaz en Laŭzano kiel aliĝintojn al la esperanto-movado, entute 26 personojn el Vaŭdo tiam anoncis sian intereson pri la zamenhofa lingvo. En la dua nomaro oni trovas la Societon de Junaj Komercestoj kiel aliĝinton. Ĝuste el tiu medio, sed ankaŭ el agrikulturaj, administraj kaj stenografiaj cirkloj fontis la unuaj adeptoj de la laŭzana kaj vaŭda esperanto-movado. Dum la unuaj nomoj restis nekonataj, Eugène Failletaz (1873-1943) eniris la historion kiel unua prezidanto de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj kiel grava pioniro de la industri-komerca movado en Laŭzano, kunfondinto de la Vaŭda komerca kaj industria ĉambro (1898) kaj unu el la iniciatintoj de la vaŭda specimena foiro en Laŭzano (Comptoir Suisse 1916). Svisa Esperanta Societo (SES) estis fondita en Vaŭdo. En Rolle ĉe la hotelo "Tête Noire" la 27-an de septembro 1903 okazis la unua kunveno de SES; detala raporto pri tiu grava evento aperis en *Svisa Espero*, n-ro 5/1903.

Do, kompare kun Ĝenevo, kie ĉefe la „filologiaj“ intelektuloj (Naville, Privat, de Saussure, Renard, ktp.) kreis la bazon de la Esperanto-movado, kaj diference de Neuchâtel, kie multaj instruistoj-pedagogoj (Stroele, Ducommun, Dubois, Wenger, Bovet,

ktp.) disvastigis esperanton, la esperanto-movado de Laŭzano kaj per tio de la vaŭda kantono povas rerigardi al ia komercista-induŝtrista, poste ankaŭ laborista-fervojistia tradicio. La esperanto-agado kun kursoj kaj prelegoj komenciĝis en la komerca lernejo ĉe placo Chauderon, kie formiĝis la esperanto-movada vivo de Laŭzano. Precipe la Popoldomo de Laŭzano longe ludos la rolon de kunvenejo de la laŭzanaj esperantistoj, fakte ĝis 1995.

*D. Ludwik Zamenhof*

*Kartono*

*al D. Zamenhof*

Karto de D-ro Ludwik Zamenhof, kiu manskribis al la Laŭzana Grupo Esperantista rekomendon favore al sia filo Adamo:

*"Al la Lozanna Grupo  
Esperantista mi transdonas mian  
koran saluton per mia filo Adamo.  
L. Zamenhof.*

*Al la Lozanna Grupo  
Esperantista mi transdonas  
mian koran saluton per  
mia filo Adamo.*

*Zamenhof*

La laŭzana esperanto-grupo unuafoje kunvenis la 8-an de marto 1903 en la ĉeesto de la eminenta esperantisto Théophile Cart (1855-1931). Ĉi tiu verva svisdevena apoganto el Francio

publike elpaŝis pri esperanto ankaŭ en Ĝenevo, Morges ktp. La laŭzana esperanto-grupo estis oficiale fondita komence de 1906 sub la prezido de s-ro Du Pasquier, komitatano de SES, kaj post ties foriro estis pluestrata de Edouard Mallet (novembro 1906), konata nomo ankaŭ en la tiama ĝeneva esperanto-grupo.

En 1909 en Laŭzano ekzistis du esperanto-grupoj: Laŭzana Esperantista Grupo, kiun estris iu s-ro Andréassian, ges-roj Paul Ketterer (instruisto en la blindulejo de Laŭzano) kaj s-ro Caumont; Fernand Bussy estis la kasisto. La grupo kunvenis lunde, ĵaŭde kaj vendrede en la komerca lernejo ĉe placo Chauderon. La dua grupo estis tiu de la Liberpensuloj-esperantistoj, starigita de iu s-ro J. Eydelnanth. Poste tiu grupo alprenis la nomon Esperanto-Grupo Frateco.

*Svisa Espero* en septembro 1909 raportis, ke en la jenaj laŭzanaj firmaoj oni parolas esperanton: Berthon & Valat, kombistoj; Buffet de la Gare; fratoj Fleurdelys, bindistoj, Renens; Hotelo Ste-Luce; Instituto Jaccard; presejo Jaunin; librejo Sack; Mottier kombisto.


En *Svisa Espero*, oktobra numero 1909, aperis bela foto kun grupo de esperantistoj farita dum la ĝenerala kunveno de SES en Laŭzano la 9-10-ajn de oktobro (sur tiu foto bone videblas Edmond Privat kaj René de Saussure).

Situacio en aliaj urboj kaj regionoj: En 1903 *Feuille d'Avis d'Avenches* (4.2.) raportis pri parolado de Edouard Ducommun en Avenches, *Journal de*

*Nyon* (18.3) kaj *Feuille d'Avis de la Côte* (10.3.) skribis pri prelego de Théophile Renard en la Societo de l' Junaj Komerclistoj en Nyon kaj Rolle.

La unua nomaro de l'esperantistoj en SE 2/1903 menciis s-inon Schenk-Roessinger kaj f-inon Alice Schenk en Rolle, kiu kun sia fratino Cécile tuj organizis grupon kaj la unuajn kursojn kaj verkis gazetartikolojn (ekz. *Journal de Leysin*). Gustave Maillard agadis por esperanto en Vevey, kie en 1910 estis fondita loka Esperanto-Grupo, sub la gvido de Charles Balsiger, C. Francina en Nyon, kie formiĝis esperanto-grupo kadre de la loka Societo de Junaj Komerclistoj. En 1905, f-inoj Hoffmann kaj Richardet kaj s-ro Yersin komencis esperantokurson en Morges, dum Edmond Privat (1889-1962) prelegis antaŭ 300 aŭskultantoj en la kolegia aŭditorio de Yverdon, kie propra Esperanto-Grupo Pestalozzi estis starigita fine de 1906 aŭ komence de 1907 kun prof. d-ro Paul Jomini kiel prezidanto. Samtempe aperis esperanto-grupo en Begnins kun Gervais Addor kiel prezidantino. En majo 1909 estis inaŭgurita Esperanto-Domo en Morges. Poste la esperantogrupo de Morges estis almenaŭ dufoje refundita: en 1913 de Hélène Monod (+1954) kaj en 1927 de la geedzoj Jayet. Charles Jayet (1881-1961) estis komercisto (spicisto), esperantisto ekde 1904, kiu de 1908 funkciis seninterrompe kiel delegito de UEA en sia urbo, respektive de IEL dum la skismo. UEA kaj SES (1949) nomis lin honora membro. Lia edzino Jenny Jayet-Besson (1883-1944), kiu agadis

en la virina asocio de Morges (kiel prezidantino) kaj en bonfara organizo, kiu luktis kontraŭ malsanoj kaj malbona nutrado kaj por ke malriĉuloj ricevu vestaĵojn, oficis ankaŭ kiel sekretariino de la esperanto-grupo Morges. Esperanto ligis la paron dum 34 jaroj. En 1922 s-ino A. Mexin fondis infanan esperanto-grupon en Montreux. La revuo *Esperanto* (UEA) n-ro 11/23 raportis pri la starigo de esperanto-grupo en Renens.



Hector Hodler en 1912 laŭ karikaturo desegno de Jean Robert. (CEDELI)

La ĉeesto de René de Saussure (1868-1943) en la vaŭda alpa vilaĝo Château d'Œx, kie li regule feriadis kaj kie li kutimis prelegi pri esperanto kaj gvidi esperanto-kurson antaŭ internacia partoprenantaro, kondukis eĉ al la formado de loka esperanto-grupo en 1910/12. En tiu kunteksto indas

memorigi, ke Hector Hodler mortis en 1920 en la kuraĉloko Leysin, kiu same apartenas al la vaŭda kanton.

Aliaj du gravuloj ankaŭ devenis de la vaŭda kanton:

August Forel (1848-1931), fama svisa klerulo, sciencisto kaj socia aganto kun monda signifo, kuracisto-psikiatro, social-higienisto, seksologo, pacaktivulo, reformisto, filozofomoralisto kaj batalanto kontraŭ la alkohola misuzo. Lige kun siaj humanismaj kaj pacismaj engaĝiĝoj, Forel dekomence rilatis simpatie al la ideo de artefarita mondhelplingvo kaj uzis plurajn okazojn esprimiĝi, publike aŭ en artikoloj, pri senco kaj esenco de la mondhelplingva ideo. En 1906, Forel lernetis esperanton kaj partoprenis la 2-an Universalan Kongreson en Ĝenevo, kie li renkontis L. L. Zamenhof. Post sia emeritiĝo en 1897 li retiriĝis al Yverne/VD, kie li akiris domon, kiun li baptis je la nomo „La Fourmillière”. Ĉi tiu Formikejo fariĝis centro de vigla aktiveco kaj scienca esplorado kaj korespondado. Ĉi tie Forel persone konatiĝis interalie kun la fama franca verkisto Romain Rolland (1866-1944), kun kiu korespondis ankaŭ Edmond Privat.

La dua vaŭddevena samideano nomiĝas Henri Dor (1835-1912). Li naskiĝis en Vevey. Filo de pastoro, kuracisto franc-devena kaj poste fama oftalmologo, studinta medicinon en Zuriko kaj en aliaj universitatoj de septlandoj, inter 1858 kaj 1860 li laboris en granda malsanulejo en Liono (Francio) antaŭ ol reveni en 1860 al Vevey/VD, kie li aktivis kiel okulkuracisto. Ĉi tie li

konatiĝis kun Nestlé, la fondinto de la loka ĉokolada fabriko tutmonde famiĝonta. En 1876 Dor translokiĝis al Liono, kie li fondis oftalmologian klinikon kun filantropa karaktero, kiun li estris pli ol tri jardekojn ĝis la morto.

Andy Künzli

## Gazet-artikoloj

Rilate al la jubilea sabato de la 27-a de septembro aperis artikoloj en la gazetoj *24 heures* (Lausanne), *La Liberté* (Fribourg) kaj *La Côte* (Nyon). Tiuj artikoloj, same kiel ĉiuj, kiujn ni kapablas kolekti, arkiviĝas ĉe CDELI. Sed bedaŭrinde ne facilas ilin rikolti. Ni ekzemple scias, ke verŝajne artikolo ankaŭ aperis en *Le Courier* (Genève) kaj eble en aliaj gazetoj, sed neniuj havis la bonan ideon ilin sendi al CDELI. Tial ni profitas alvoki ĉies kunlaboremon. Se vi rimarkas artikolon kun rilato al esperanto aŭ al mondlingva problemo, tiam bonvolu ĝin sendi al CDELI kun nepre preciza indiko pri la nomo mem de la gazeto kaj de la koncerna aperdato. Tro ofte artikoloj fine atingas CDELI-n sen tiuj ĉi minimumaj indikoj, kio ĝenerale malhelpas ilian kontentigan registron.

Ofte nur post longaj jaroj kaŭze de translokiĝo, de pensioniĝo aŭ eĉ de morto, CDELI ricevas kolektojn de malnovaj gazetartikoloj. Per ili kompletiĝas la artikol-kolekto de CDELI, kiu estas daŭre surloke konsultebla.

Claude Gacond.

## Nova kasisto de SES

Pro neatendita demisio de Elisabeth Lauper la estraro devis serĉi novan kasiston. Tio estis ne facila, sed ni havis ŝancon. Pretis transpreni tiun oficon s-ro Hans-Werner Grossmann en Muttenz. Li estas samtempe delegito de UEA kaj patrono de SES. Ni dankas lin pro la kunlaboremo.

Elisabeth Lauper oficis dum 4 jaroj kaj enkondukis perkomputilan librotendon. Ŝi estas fakulino kaj raciigis la procedojn. Ni dankas ŝin sincere pro la farita laboro.

Bruno Graf

## Donacoj

Pro la ŝanĝo de kasisto la registro de la donacoj ricevataj listiĝos en la venonta bulteno. Tamen poŝtpagilo akompanas la nunan bultenon kun antaŭdankemo al ĉiuj, kiuj malavare akceptos ĝin por ekzemple esprimi sian apogon al la "Agado 2003", kiu celebros ĝis la aŭtuno 2004 la centjariĝon de SES kaj de la veno al esperanto de la pioniroj Hector Hodler kaj Edmond Privat per vico da signifaj aranĝoj: ekspozicioj pri esperanto en diversaj lokoj, festaj renkontoj, eldono de enciklopedio pri esperanto kaj planlingvistiko en Svislando, ktp. La sukceso mem de tiu "Agado 2003" dependas de la monrimedoj disponeblaj.

Claude Gacond.

## SES invitis al informa kunveno

Tiu evento maltrafis la redaktofinon kaj aperas informcele anstataŭ invit-cele. Tamen la lokaj informiloj de Lausanne kaj Genève anoncis la kunvenon.

SES okazigis informan kunvenon marde 4-an de novembro 2003, 18h30 – 20h00 en Genève, restoracio Aux Cheminots, 7, rue des Gares. La motivo estis subteni lokajn grupojn en la varbado.

S-ro Jo Catil, estro de CERL (Centre Espéranto de la Région Lyonnaise) prezentis la varbilojn de Espéranto-France kaj konsilis pri la maniero propagandi. CERL regule aktivas, organizas kursojn kaj dissendas monatan cirkuleron.

SES ne posedas proprajn varbilojn en la franca lingvo kaj rekomendas uzi tiujn de Espéranto-France, kiuj estas modele faritaj. Ni devus varbi pli ofte kaj metode.

Bruno Graf

## Kiel svisa Esperantio strukturiĝas?

Bruno Graf

### Peto de la jarkunveno


Dum la lasta jarkunveno de SES en Basel membroj petis klarigojn pri la strukturo de svisa Esperantio. Afere konata de spertuloj, sed ne de novuloj kaj neaktivuloj. Sekve mi prezentis tiun strukturon en la grupoj de

Lausanne kaj Genève. La aŭskultintoj estis tre interesataj kaj vigle diskutis. Ili ankaŭ petis, ke la prelego aperu en nia bulteno. Jen.

Kiam mi preparis la tekston, mi tuj konstatis, ke ne eblas paroli nur pri svisa Esperantio. Multaj svisaj esperantistoj estas membroj de aliaj kaj internaciaj asocioj kaj ligitaj kun ili. Tio devigis min larĝigi la temon kaj prezenti la tutajn.

Vidu nun la aldonitan bildon kaj kontrolu, ĉu vi konas ĉiujn asociojn aŭ establojn.

### Strukturo de svisa Esperantio.



Nur poste reiru al tiu teksto por serĉi pliajn informojn. Ankaŭ se vi opinias, ke vi estas bone informita, vi malkovros novajn faktojn. Almenaŭ mi spertis tion.

### La neorganizitaj esperantanoj

Mi komentas la bildon de sube al supre kaj komencas per la neorganiz-

itaj esperantanoj. Ili estas pli grava segmento, ol oni pensas, ĉar pli kaj pli da interesatoj lernas esperanton per la reto. Ili enfluas la asocian vivon aŭ perdiĝas. Ni montru al ili, ke organizita esperantano havas pli da avantaĝoj praktiki esperanton. Lokaj grupoj ludas gravan rolon por la integriĝo.

### La grupoj

En Svislando ekzistas formale 6 lokaj grupoj, kiuj kunsidas monate. La Stelo en Genève mirigas per la nombro da lernantoj kaj la diversaj kursoj. Ili okazas en la popolaltlernejo, apude viglas konversaciaj rondoj, unu gvidata eĉ de Claude Piron. La klubo funkcias momente sen komitato kaj decidas de kunsido al kunsido. La informilo *Brasikfolio* estas aparte bone verkita kaj presita senkoste de la presejo Pot. Ankaŭ Lausanne havas informilon kaj organizas kursojn, senpagajn enkondukojn laŭ la metodo de François Randin, sed ankaŭ dum posttagmezo por gejunuloj kadre de la feria pasporto de la urbo. Same faras Nicole Bérout en Basel, kiu eldonas informilon *Sud-Rejna Kuriero* kune kun Esperanto-Societo Mulhouse. Mirinde, ke lokaj grupoj trovas rimedojn por prezentindaj informiloj. Zürich elektis alian vojon kaj informas la membraron per *SES-informas*. Veraj aktivuloj estas Dietrich kaj Nélida Weidmann, kies laborejo estas samtempe esperanta elmontrejo. La societo organizas regule stand-agadojn sur strato aŭ placo. Luzern kaj Wil havas bone planitan grupan vivon. Indas aldoni, ke la grupoj estas sendependaj de SES.

Evidente ili tro maljuniĝas, sed interreto donas esperon.

## SES

### Svisa Esperanto-Societo

SES estas landa asocio de UEA. Ni festas ĉijare la centjariĝon, ĉar ĝi estis fondita en 1903. Laŭstatute SES celas disvastigi en nia lando esperanton kaj ties kulturon. La societo estas politike kaj religie neŭtrala.

SES plenumas jenajn taskojn:

- Informi la gazetaron kaj publikajn instancojn sur nacia tavolo. Dietrich Weidmann agas germanlingve, Mireille Grosjean franclingve.

- Informi la membraron pri la esperanta vivo en Svislando. Ni faras tion per nia bulteno *SES informas*, zorge redaktita de Claude Gacond, esperantologo.

- Disponigi informilojn kaj materialon por la varbado.

- Okazigi kunvenojn por kuraĝigi aktivulojn eki kaj subteni iniciatojn.

- Kunlabori kun UEA, observante ties laborplanon.

SES havas ĉirkaŭ 150 membrojn kaj 25 abonantojn, rilatas kun pliaj 200 interesatoj. Ni stagnas, sed ne regresas. Vizitu nian retejon, kiu alportas regule informpetojn:

[www.esperanto.ch/ses](http://www.esperanto.ch/ses).

## JES

### Junularo Esperanta Svislanda

JES revigliĝis sub la gvido de Benno Frauchiger, kiu eldonas dufoje jare la bultenon *Jes! kompreneble...* esperant- kaj nacilingve. Ĝi estas enhave interesa kaj grafike plaĉa. SES dissendas ĝin al sia anaro por stimuli la



reciprokan kunlaboron. JES celas la vivigon kaj disvastigon de esperanto inter gejunuloj. Pro tio ĝi organizas aktivecojn kaj renkontiĝojn kiel la vintrajn semajnfinojn. La membroj, ĉirkaŭ 20, aĝas inter 14 kaj 30 jaroj. JES estas sendependa de SES dum ĝi anas al TEJO = Tutmonda Esperanto Junular-Organizo.

### **CDELI**

**Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale**  
**Centro de dokumentado kaj esploro pri la Lingvo Internacia.**

Fakte CDELI estas sekcio de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds. SES estas ligita al ĝi per konvencio, ĉar CDELI konservas ĝian arkivon. Claude Gacond fondis kaj gvidas tiun centron kun granda sindonemo. Li ne nur kolektas ĉion pri esperanto, sed ankaŭ pri planlingvoj. Cetere li organizas en la biblioteka salono regule studsabatojn kaj kolokvojn. CDELI estas grava piliero de svisa Esperantio.

### **KCE**

**Kultura Centro Esperantista**

KCE, La Chaux-de-Fonds, chemin des Postiers 27, estas transnacia, neŭtrala kulturcentro, gvidata de komitato, ĉefe de Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer. Laŭstatute la celo estas disvolvi la uzon de esperanto kiel transnacia kulturlingvo. KCE konsistas el apogantoj kaj membroj de la kultura konsilio, kiu manke de intereso apenaŭ funkcias. Teamo aranĝas altnivelajn seminariojn kaj kulturajn monafinojn. SES pruntedonis krediton de frankoj

15'000 kaj donacas la interezojn. Nicole Margot, sekretario de SES, reprezentas SES-on en la jara asembleo. Laŭ regularo SES cedis al KCE okazigi ekzamenojn. Ne plu aperas propra informilo, sed KCE informas per la gazeto *Heroldo de Esperanto*. En la centro troviĝas la buroo de la Civito, KCE ja eniris la pakton. Tiu orientiĝo ne nur helpas, sed ankaŭ malhelpas.

### **UEA**

**Universala Esperanto-Asocio**

UEA estas la plej granda esperanta organizaĵo kun membroj en 117 landoj. La strategio de UEA celas atentigi pri la neceso de egaleco inter lingvoj. La statuto listigas kvar celojn:

- Disvastigi la uzadon de esperanto.
- Agadi por la solvo de la lingva problemo en la mondo.
- Plifaciligi la spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj.
- Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco.

UEA reprezentas la movadon ĉe internaciaj instancoj kiel Uno, Unesco, Konsilio de Eŭropo, kaj aliaj. La Centra Oficejo troviĝas en Rotterdam, kie kutime laboras 10 oficistoj, ne ĉiuj plentempe. Ekzistas ankaŭ oficejoj en Novjorko, en Lomeo (Togolando) kaj komunikadcentro en Bruselo. La konstanta kongresa sekretario organizas la famajn Universalajn Kongresojn, ĉiujare en alia lando. UEA estas grava eldonanto de libroj, la Jarlibro kun la delegita reto estas vera manlibro. La revuo *Esperanto* informas monate pri la movado. La

Centra Oficejo trairis krizon pro la demisio de oficistoj.

D-ro Renato Corsetti (Italio) prezidas la estraron dum Trevor Steele (Aŭstralio) funkcias kiel ĝenerala direktoro. François Randin estas ĉefdelegito por Svislando kaj Mireille Grosjean reprezentas SES-on en la komitato de UEA. UEA estas ofte kritikata, ĉar ĝi ŝajnas respondi pri ĉio.

## TEJO

**Tutmonda Esperanto-Junularorganizo**

TEJO la junularsekcio de UEA, laboras ene de UEA. La oficiala informilo estas *TEJO-tutmonde*. Aperas alia socikultura gazeto por ĝenunuloj *Kontakto*. TEJO organizas ĉiujare Internacian Junularan Kongreson. Plej konata estas la tiel nomata *Pasporta Servo*, listo de esperantistoj, ĉe kiuj esperanto-parolantoj povas trankvile senpage. Estraro kaj komitato estas la gvidorganoj. Momente ili malcontentas pri la nuna stato kaj postulas de UEA pli da rimedoj.

Multaj fakaj asocioj estas ligitaj al UEA. La plej konata estas ILEI.

## ILEI

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.**

Jen kiel estas precizigitaj la celoj de la organizaĵo. ILEI

- celas enkonduki esperanton en lernejarajn studprogramojn.
- plenumas la edukon programon de UEA kaj organizas ekzamenojn dumkongrese.
- organizas ĉiujare konferencon kun fakaj prelegoj.

- eldonas la organon *Internacia Pedagogia Revuo* kaj la kajeron *Juna Amiko* por lernejanaro.

- lanĉis la projekton Interkulturo, la virtualan lernejon.

ILEI havas sekciojn en 30 landoj, sed agadas sen oficejo aŭ profesia stabo. Mireille Grosjean vivigas la svisan sekcion.

## SAEF

**Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj**

SAEF estas ligita al IFEF = Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kiu kunlaboras kun UEA. SAEF informas per la bulteno *Svisa Fervojisto* redaktata de la prezidantino Gertrud Eggenberger. SAEF ricevas subvencion de SBB/CFF kiel kultura asocio. La membrostato estas 90, sed multaj pasivas aŭ ne parolas la lingvon. SAEF organizas dufoje jare en Rotkreuz la aranĝojn GERI = Gaja Esperanto-Rondo Instruiteca, por stimuli la lingvokapablon. Oni cerbumas pri malfondo, ĉar la estraro tro maljuniĝis kaj ne troviĝas posteuloj. Domaĝe, ĉar ĝuste fervojistoj povas facile eluzi la avantaĝojn de esperanto.

## SAT

**Sennacieca Asocio Tutmonda**

SAT estas la dua plej granda tutmonda esperanto-organizo kun sidejo en Parizo. Kontraste al UEA, SAT ne sekvas politikan neŭtralecon, male celas subteni tutmondan dialogon inter la laboristaro kaj volas subteni siajn membrojn por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al pli alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo. SAT laboras unue per kaj malpli por

esperanto. Ĝi utiligas esperanton por siaj celoj. Ĉiujare okazas SAT-Kongreso. Aperas monate la gazeto *Sennaciulo* kaj de tempo al tempo la *Sennacieca Revuo*. SAT eldonis sciencajn kaj literaturajn verkojn, el kiuj plej elstaras *Plena Ilustrita Vortaro*. SAT-anoj apartenas al plej diversaj maldekstraj partioj, kiuj organizas sin en frakcioj. Gvidpunkto estas la eldiro de Lanti: SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo. SAT-Amikaro akcentas la edukon kaj kulturan flankon de la movado.

### Esperanta Civito

Esperanta Civito estas provo krei jure lingvan komunumon, elpensitan de Giorgio Silber kaj aliaj, lanĉitan en 1998 en La Chaux-de-Fonds. Bazo de la Civito estas pakto kun kvin ĝeneralaj tezoj kaj konstitucia ĉarto. La Civito havas politikan strukturon. La establoj aliĝintaj estas reprezentitaj egalrajte en la forumo. La membroj aŭ abonantoj de tiuj establoj rajtas peti la civitanecon kaj tiel elekti la senaton, kie la diversaj listoj de individuaj civitanoj estas reprezentitaj. Forumo kaj senato formas kune la parlamenton. La konsulo reprezentas la Civiton, prezidas la parlamenton kaj gvidas la ekzekutivan organon, nomatan kapitulo. La kortumo estas la arbitracia instanco de la pakto.

La Civito estas por multaj stranga fenomeno. La organizo aspektas kiel ombra kabineto, kun trajto fundamentista, ja sekteca. Ties informservo *HeKo* fanfaronas kaj kritikis regule la organojn de UEA, prezentas sin super-

eca kaj kontraŭmovada. Tio vekas suspekton. La Civito ne tiel kreskis, kiel la iniciatintoj esperis. Svisaj esperantistoj restas dubemaj.

Bruno Graf

## Venontaj Jubileaj rendevuoj

Nepre rezervu la sekvajn datojn.

### Vevey

7-an de februaro 2004

### Historio de SES

kun Andy Künzli kaj Claude Gacond  
Vidu la akompanan informilon!

### Le Locle – Les Brenets 24-25-ajn de aprilo

Sabate

Ĝenerala kunveno de SES en Le Locle kaj renkonto kun la gelernantoj de la lernejo La Grande-Ourse kaj kun la lokaj aŭtoritatoj en Les Brenets por honorigi la memoron de Edouard Ducommun: pioniro de la instruado de esperanto en la lernejo. Promenado ŝipa kaj marŝa al Sault-du-Doubs kaj por tiuj, kiuj ne tuj rehejmiĝos festa vespero en naturamika domo kaj dimanĉa programo konatiga kun la ĵurasaj pejzaĝoj.

Informoj sekvos.

# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

Centro de Dokumentado kaj  
Esploro pri la Lingvo Internacia  
Biblioteko de la Urbo  
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds  
Tel.: 032 967 68 55.  
Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.  
Retadresoj: [CDELI.VCH@ne.ch](mailto:CDELI.VCH@ne.ch)  
[martine.schneller@ne.ch](mailto:martine.schneller@ne.ch)  
[claudes.gacond@ne.ch](mailto:claudes.gacond@ne.ch)  
[nancy.fontannaz@ne.ch](mailto:nancy.fontannaz@ne.ch)

## Studsabatoj didaktikaj ĉe CDELI

Sub la gvido de Claude Gacond, Monika Molnar, Stefano Keller kaj Nancy Fontannaz didaktikaj stud-sabatoj okazantaj preskaŭ ĉiumonate ĉe CDELI alportas utilan helpon al la lernantoj kaj instruantoj de esperanto. Tial ilia frekventado estas konsilinda al ĉiuj studemuloj. Kiu volas progresi en la praktiko de esperanto, tiu rezervu la 6 venontajn sabatojn en sia agendo: **novembre 15, 2004 januare 17, februare 21, marte 20, majo 15, junio 19 kaj novembre 20.**

Programo de la venontaj studsabatoj:

**La supera grupo** kun Claude Gacond intimiĝos kun la vivo, penso kaj verkaro de L. L. Zamenhof per 4 studkajeroj.

**La meza grupo** kun Monika Molnar lertiĝos en la parola uzo de la lingvo.

**La komercanta grupo** kun Stefano Keller akirus bazajn konojn.

Por minimuma kovro de la elspezoj estas petata partoprenkotizo de F 10.- Senpage por JES-anoj.

### Aliĝo

Por faciligi la organizon de la aranĝo la partoprenantoj bonvolu ĉiam anonci sian aliĝon al

Claude Gacond, Esperanto, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds 5.

Rete: [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

Tel: 032 926 52 32 aŭ 032 967 68 55.

### Horaro

**9h30: Malfermo de la CDELI-salono:** eblo aĉeti brokantajn kaj novajn librojn.

**11h00: Oficiala malfermo** kaj formiĝo de la stud-grupoj. 11h45: Kafuma paŭzo. **12h00: 2-a stud-periodo.** 12h45: Komuna tagmanĝo en la restoracio Ital'Panini, Serre 25. **14h30: 3-a stud-periodo.** 15h15: Teuma paŭzo. **15h30: 4-a stud-periodo.** **16h15: Konkludo de la renkonto** en la CDELI-salono, kie eblas resti por teumi, babilu, akiri librojn ĝis la propra forirmento. **17h30: Oficiala fermo.**

### Enirejo al la CDELI salono

3-a pordo nord-orienta de la biblioteka domo.

### Por atingi la bibliotekon

**El la stacidomo:** La biblioteko situas ĉe la strato Progrès N° 33. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buslinio 4, direkto "Hôpital". Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon "Bibliothèque".

**Aŭtomobile:** Ekde la urba enirejo videblas indikiloj konduke al la biblioteko.



junularo esperanta svislanda  
jeunesse espérantophone suisse  
junges esperantio schweiz  
gioventù esperantista svizzera  
giuventetgna esperantista svizra

Postfach 3324, 4002 Basel

Telefón-numero: 061 301 2705

info@jesperanto.ch

www.jesperanto.ch

Prezidanto. Laurent Burgbacher

Sekretario: Joëlle GROSJEAN

## Nova komitato

Je la 25-a de oktobro okazis Ĝenerala Asembleo de JES en la stacidoma bufedo de Lausanne. Partoprenis ĝin 7 aktivaj junuloj. La plej gravaj rezultoj estis la elekto de nova komitato, kaj la aprobo de la agadplano por la jaro 2004.

De la komitato demisiis:

Olivier Amrein, vic-prezidanto (mondvojaĝanta) kaj Celestina Kuhl, kasisto (mondvojaĝonta).

Kaj nove elektiĝis:

Laurent Burgbacher, prezidanto kaj retestro.

Adelaïde Charrière, vic-prezidanto kaj eksteraj rilatoj; ŝi ankaŭ estas komitatano de la franca esperanto-junularo (JEFO).

Joëlle Grosjean, sekretario.

Benno Frauchiger, kasisto kaj redaktoro.

La ĉefaj agadoj por la jaro 2004 estos:

- SViS (Svisa Vintra Semajnfino), 13-15 februaro en Kandersteg, dum kiu ni kune kun SES vizitos la konstruejon de la nova Lötschberg-tunelo, (vidu la invitilon ĉi sube)
- Kurssemajnfino, 15-16 majo. Por kreskigi nian membraron, ni konstatis, ke nepras organizi kurssemajnfinojn por junuloj. Ni klopodos allogi junulojn el ĉiuj lingvaj regionoj de Svislando.
- informado perreta kaj perbultena plu daŭros.

La Ĝeneralan Asembleon sekvis bona gusta fonduo en tradicia laŭzana restoracio.

Benno Frauchiger.

## Invito al ĉiuj

por vizito ĉe la konstruejo de la nova Lötschberg-tunelo.

Tradicie Svislando konstruas je ĉiuj cent jaroj du grandajn fervojajn tunelojn tra la Alpoj. Unu tra Gotthard, la alia tra Lötschberg. Jam pasis nun pli malpli cent jaroj ekde la lastaj konstruadoj, do tial denove du tiaj fervojaj tuneloj estas konstruiĝantaj.

Ĉar vi certe ne volas maltrafi tiun esceptan okazon por sperti tunelkonstruadan etoson, JES invitas vin por viziti la konstruejon de la Lötschberg-tunelo en Mitholz (inter Frutigen kaj Kandersteg) je

vendredo, la 13-an de februaro 2004, je la 14-a horo.

Ni atentigas, ke la nombro de partoprenantoj estas limigota, la kostoj estos po frankoj 10.- por persono.

Por aliĝo kaj por pli precizaj informoj kontaktu Benno Frauchiger tel. 061 301 27 05 aŭ [benno.frauchiger@bluewin.ch](mailto:benno.frauchiger@bluewin.ch), aŭ skribu al: Junularo Esperanta Svislanda, Postfach 3324, 4002 Basel.

# KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311

2301 La Chaux-de-Fonds.

Tel. kaj fakso: (032) 926 74 07.

[kce.esperanto@bluewin.ch](mailto:kce.esperanto@bluewin.ch)

## Kalendaro

Jen la kalendaro de KCE en 2004. (Sen alia indiko, la menciita aranĝo okazos ĉe Domo Naville de KCE en La Chaux-de-Fonds).

**Januare 2-4:** Zamenhofologiaj tagoj, dediĉitaj al la centa datreveno de Lidja Zamenhof: prelegoj kaj/aŭ skribaj kontribuoj de Francisko Degoul, Zofia Banet Fornalowa, Perla Martinelli, Giorgio Silber kaj aliaj zamenhofologoj.

**Januare 31:** Ordinara asembleo de KCE.

**31 & februare 1:** Kultura semajnfino pri lingvistika temo: prelegos membro de la Akademio de Esperanto.

**Februare 28-29:** Kultura semajnfino.

**Marte 27-28:** Kultura semajnfino pri literatura temo.

**Aprile 8-12:** Plurnivela internacia kursaro: komencantoj, progresantoj, esperanto-metodiko.

**Maje 22-23:** Kultura semajnfino pri Ruslando kun Anatolo Gonĉarov.

**Julie 05-10:** Naturamika semajno en Grindelwald kun Francisko Degoul.

**Julie 13-18:** Plurnivela internacia kursaro: unua semajno.

**20-25:** Plurnivela internacia kursaro: dua semajno.

**Aŭguste 02-06:** Naturamika kaj romanĉa semajno en Engadino (konfirmota).

**07-14:** Kultura esperanto-semajno. En la programo: muziko, teatro, prelegoj, studgrupoj, atelieroj, ekskursoj kaj simpozio pri la esenco kaj estonteco de Esperantio (en kongresejo kun teatro).

**14-21:** Seminario por la trejnado de kulturaj manaĝeroj kunlabore kun TEJO (parte ekster la domo Naville).

**Septembre 25-26:** Kultura semajnfino pri muziko, prelegos (kaj kantos) Georg Roessler kaj Jean-Thierry von Büren (konfirmota).

Sekvos aliaj kulturaj semajnfinoj en oktobro kaj novembro, kaj zamenhofologiaj tagoj en decembro 2004.

# SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj  
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10  
8405 Winterthur Tel.: 052 233 47 64  
[gertrud.eggenberger@bluewin.ch](mailto:gertrud.eggenberger@bluewin.ch)

## Por praktiki esperanton

Kora invito partopreni la 41-an Gaja Esperanto-Rondo Instruisteca (GERI), sabaton 15-an de novembro, 9h30-16h15, en "Lindenstube", 4-a etaĝo ĉe



# Loka vivo

## Basel

Esperanto-Societo Basel  
PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12  
Kunvenoj: 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

### Venontaj kunvenoj

**Novembre 27:** Decido pri laProgramo 2004.

**Decembre 6:** Zamenhofa festo en Germanio.

"Zentrum Dreilinden" en Rotkreuz (rozkolora konstruaĵo vid-al-vide de la stacidomo.

La aranĝo GERI donas al ĉiuj eblon praktike apliki esperanton. Ĝi taŭgas por komencantoj kaj progresantoj.

La partopreno estas senpaga kaj la prezo por la komuna tag-manĝo estas frankoj 15.

Aliĝo kiel eble plej rapide direktiĝu al Gertrud Eggenberg laŭ la ĉi supra adreso.

## Fribourg

### Unua socia forumo

SES partoprenis en la unua socia forumo svislanda en Friburgo, la 20-an kaj 21-an de septembro.

Unuflanke ĉe la universitato okazis\* seminarioj kaj prelegoj. Tie Claude Piron prelegis en la franca pri la temo "Kiu lingvo por Eŭropo? Kiu lingvo por la mondo?" kaj Mireille Grosjean tradukis germanen.

Aliflanke estis nia budo ĉe la placo Python, kie ni informis la pasantojn pri

esperanto kaj pri ties rolo en lingve pli justa mondo. disponeblis multaj informiloj en la franca kaj germana, kaj aŭdeblis esperanta muziko. La reagoj estis diversaj, inter tuta senintereso kaj deziro lerni. Ni ankaŭ disdonis kelkajn KD-romajn kursojn, la samajn, kiuj estas senpage elŝuteblaj ĉe <http://www.ikurso.net/> (interesa kaj bone farita kurso).

Bedaŭrinde la forum-organizintoj ne multe varbadis pri tiu ĉi forumo, kaj finfine partoprenis malmulte da homoj, rilate al la granda nombro da okazaĵoj. La ideo tamen estas interesa, sed postulus pli bonan organizon por esti efika.

Laurent Burgbacher

PS. Fotoj de la stando estas rete videblaj:

<<http://www.alawa.ch/centjarigxo/>>

# Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Espéranto-infos: Tel.: 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des Gares, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.

## Tutmonda pintokunveno pri la socio de komunikado en Ĝenevo

Sommet mondial sur la société de la  
communication à Genève.

Komuniko de Mireille Grosjean

<[Mireille.Grosjean@rpn.ch](mailto:Mireille.Grosjean@rpn.ch)>

sekretariino de SAT-Amikaro  
por romanda Svisio:

Unuiĝintaj Nacioj UN havas ĉefan sidejon en Novjorko kaj ĉefan eŭropan sidejon en Ĝenevo. En Ĝenevo okazos en decembro (10-12-ajn) pinta konferenco de ŝtatestroj, ministroj pri informado, kun la temo "*Ligu la neligitajn*", ni konektu la personojn el la tria mondo pere de materialo por celi cirkuladon de la informado. La Estraro de UEA klopodas partopreni la konferencon. La svisaj geesperantistoj emus montri sin surstrate antaŭ la konferenco kaj varbadi pri esperanto, kvankam la temo de la konferenco ne precize ligiĝas al lingva problemo. Tamen, ĉar multaj ĵurnalistoj estos en Ĝenevo, la manifestacio povas movigi la pensojn. Plej multe da gesamideanoj estas petataj kunveni sabate la 6-an de decembro 2003 je la 14h00 antaŭ la ĉefa stacidomo de Ĝenevo (kies nomo estas Cornavin).

**venu al ĜENEVO!!**

Ni kune marŝos al Palaco de Nacioj, sidejo de UN. Tie estas placo, kie ni staros kaj informos la publikon. Ni havu banderolojn kun frapfrazoj pri esperanto kaj lingva demokratio. Fino je proks. 16h30. Gazetara konferenco



okazos ĵus antaŭ la marŝo. Partopren-ontoj povas esti personoj favoraj al esperanto, ne nepre devas esti esperanto-parolantoj. Ĉar ni ne deziras iri dek-ope, sed ŝatus atingi pli altan nombron, 100, 200 eble pli, ni petas la gesamideanojn, kiuj decidas veni, aliĝi ĉe Mireille Grosjean, cp 9, CH-2416 Les Brenets.

Retpoŝte: <[mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch)>  
antaŭ la 15-a de novembro.

Antaŭdankas pro via kunlaboro Mireille Grosjean.

Pri la koncerna temo vidu ankaŭ en la franca lingvo (inter multaj aliaj):

<http://www.itu.int/wsis/index-fr.html>

<http://www.geneva2003.org/home/summit/summit02.html>

[http://www.villes-](http://www.villes-internet.net/rubrique.php?id_rubrique=133)

[internet.net/rubrique.php?id\\_rubrique=133](http://www.globenet.org/csdptt/rapports/geneva2003_1.php)

[http://www.globenet.org/csdptt/rapports/geneva2003\\_1.php](http://www.globenet.org/csdptt/rapports/geneva2003_1.php) (forumo)

<http://www.largeur.com/expArt.asp?artiD=1080>

## Ekspozicio

**Charles Baudouin (1893-1963)**

**Musée de Carouge**

2, Place de Sardaigne, 1227 Carouge

**29 novembro – 18 januaro 2004**

Dank'al la kunlaboro de Claude Piron kaj CDELI la vizitantoj de la ekspozicio pri Charles Baudouin malkovros, ke tiu verkisto, tradukisto kaj psikiatro praktikis esperanton. Nepre vizitinda ekspozicio, kiam SES okaze de sia centjara jubileo celas rememorigi pri la esperanto-pioniroj.

# Lausanne

**Laŭzana Esperanto-Societo**

Case postale 389, 1009 PULLY

Tel.: 021 729 58 02

<[esperanto@isuisse.com](mailto:esperanto@isuisse.com)>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

Diskuta rondo: ĉiun trian lundon kun François RANDIN, en Chailly-Lausanne. Bonvolu telefone voki lin antaŭe 076 411 14 55.

## Venontaj kunvenoj

Decembre 14: Zamenhofa festo en la restoracio "Le Milan" sub la stacidomo.

Januare 5: Prelego de Claude Gacond: Kiel prezenti esperanton al ĝenerala publiko, instruistoj, poliglotoj.

Februare 2: Ĝenerala Asembleo.

# Luzern

**Lucerna Esperanto-Societo**

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

Tel.: 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg.)

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - konversacia rondo de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz BRÜGGER en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

**Konversacia rondo** de la 14-a horo ĝis la 16-a kun Franz BRÜCKER en restoracio Simplon la 7-an de majo, 2-an de julio, 3-an de septembro, 5-an de novembro kaj 7-an de januaro 2004.

### **Kunveno:**

**Decembre 3:** Zamenhofa festo. 14h00: El la verkaro de Zamenhof kun Paul SCHERER; 14h30: Kompilado de la programo 2004.

## **Kantono de Neuchâtel**

### **La Chaux-de-Fonds Studaj rondoj ĉe CDELI**

Kun Monika Molnar kaj Claude Gacond.

**En via agendo notu la datojn de la venontaj kunvenoj: novembro 25, decembre 09, 2004 januare 06 kaj 20, februare 03 kaj 17, marte 09 kaj 23, majo 04 kaj 18, junio 08 kaj 22.**

Eniro en la CDELI-salalon eblas ekde la 19h45. Studo de la 20h00 ĝis la 21h45. Fermo de la salono je la 22h00. Alvenantoj premu la sonorilan butonon, kiu troviĝas maldekstre de la enirpordo al CDELI. (Nord-orienta pordo de la Biblioteka Domo).

Claude GACOND.

# **Wil**

## **Esperanto-Klubo Wil**

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30

Kunveno: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

## **Venonta kunveno**

**Decembre 03:** Adventa vespero kun V. Chaves-Walder, B. Pochanke kaj L. Sennhauser.

## **Raporto**

### **Belaj ekskursaj tagoj**

#### **Julia marŝa vespero**

La julian renkontiĝon ni okazigis promene de la stacidomo Wil al Drei Brunnen (Tri Fontoj). Tiu ĉarma loko troviĝas en protektata natur-areo, kie tri fontoj kreas laĝeton kaj naskas rivereton.

Ni vizitis ankaŭ apudan monteton kun renovigita moderna kruvojo, la pilgrimejon Maria-Tri-Fontoj kaj fine bonvenan restoracion, kie ni povis estingi soifegon kaj malsaton kaŭzatajn de unu-hora marŝado en bela sed iom freŝa vespero. Tiun promenon partoprenis 7 personoj, inter kiuj Teresa Wadolowska el Vroclavo (Pollando) kaj nia ĉiam aktiva oldulino Elisabeth Walder el Meilen.

## Pri la aŭgusta tradicia migrado

Ĉijare la dimanĉon 10-an de aŭgusto nia jam tradicia tuttaga migrado disvolviĝis laŭ vetero belega. La veterprognozoj pri varmega dimanĉo eĉ timigis kelkajn kunekskursi.

Al la renkontiĝejo ĉe la stacidomo Flawil venis 5 Will-klubanoj kaj la lucernanino Sonja Brun. De tie ni unue veturis per komforta, eĉ klimatizita, poŝtbuso al Degersheim. Poste jam piede tra bela arbaro kun bongustaj rubusej ni atingis vojkruĉiĝon kun benkoj invitantaj al ripozo. Ĉar fariĝis tagmezo, bongustis la kunprenitaj piknikaĵoj konsumataj en ombro de ulmoj kaj fagoj.

Nun ni devis venki plej streĉan, ĉar senombran kaj plej abruptan, vojparton. La penon rekompencis beleco de kreskantaj alpaj floroj kaj troviĝanta supre restoracio "Bergli" kun refreŝigaj trinkaĵoj kaj belega panoramo al Sântis.

De tie restis nur malsupreniri al la pitoreska vilaĝo Dicken, kie ni ripozis en ombro de grandega tilio, admiris la belege pentritan domon de la artisto Karl Ueligen kaj atendadis trankvile aŭtobuson babilante sur la teraso de la restoracio Freihof.

Lacaj ja, sed kontentegaj, ni reiris hejmen. Koran dankon al Verena por la memorinda ekskurso.

Stanislaw Pochanke.

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH

Tel.: 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

Kunvenoj regule la duan sabaton de la monato matene je la 11h00 kun komuna manĝo en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

## Kunvenoj

**Decembre 13 (sabate):**

**Zamenhofa festo** kun maten-manĝego: Tago de la libro kun prezento de libroj kaj diversaj artaĵoj. Kotizo por la maten-manĝo: fr. 10.

**Zamenhoffest** mit Brunch: Tag des Buches. Vorstellung von Büchern und verschiedene kulturelle Beiträge. Beitrag fürs Frühstück Fr 10.

**Ĉiun merkredon, jeden Mittwoch**

16.00-17.00

Libera stud- kaj konversacigrupo. Freie Esperanto-Studien und Konversationsgruppe.

Aliĝu ĝis plej malfrue la tagon antaŭe. Jeweils bis am Vortag unter Tel.: 01-251 50 25 anmelden.

Kotizo / Kursenkosten jeweils Fr. 20.

(Kiam la grupo konsistas el 5 aŭ pli da personoj la kontribuo reduktiĝas al la duono. Dum lernejoj ferioj la kurso ne okazas. Wenn di Gruppe 5 oder mehr Personen beträgt, reduziert sich der Beitrag jeweils auf die Hälfte. Während der Schulferien findet der Kurs nicht statt.)

